

Oomoto


Mar-Apr.

29-a Jaro N-ro 321-322 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo

Omaĝe al la animo de Zamenhof ĉe 50-a datoreveno de lia morto

Forpasis jam kvindek jaroj — duono da centojaro. Longa iusence, mallonga alisence.

La 14-an de Aprilo, 1917. La I-a mondomilito ankoraŭ kruele daŭris, kiam D-ro L. L. Zamenhof spiris la lastan spiron post tiom longa sopirado kaj luktado por la paco. La paco revenis finfine, sed ne pasis multe da jaroj



La tombo de L. L. Zamenhof en Varsovio (fotis Hideo Haga)

ĝis eksplodis la II-a mondomilito, kiu siavice kaŭzis centoblajn kaj miloblajn teruraĵojn al la homaro.

Kiel ĉio komencita venas al fino, ankaŭ ĝi finiĝis kaj oni diris ke la paco revenis. Ĉu tiu paco estis stabila? Neniel! Baldaŭ sinsekvis konfliktoj aŭ bataloj aŭ, pli ĝuste, militoj en Palestino, Koreujo, Suez, Hungarujo, Alĝerio, Germanujo, Kubo, Tibeto, Vietnamio ktp. Kiom da tagoj estis, en kiuj nenie okazis batalo sur la terglobo?

Ni ja hontas antaŭ la animo de nia majstro pri tio ke ni, Esperantistoj, estis tiel senkapablaj por ion fari kontraŭ la menciitaj malamikaĵoj interpopolaj.

Sed nun permesu al mi iom turni nian penson al pli pozitivaj flankoj de la mondostato kiel ankaŭ de nia movado. Post la I-a mondomilito fondiĝis Ligo de Nacioj; post la II-a, UN, certe pli racia pacorganizo, se ne perfekta. Ĝin oni devas danki almenaŭ unuavice inter la gravaj faktoroj, pro la fakto, ke almenaŭ jam dum 22 jaroj ne okazis mondoskala milito. En tiuj jaroj, en Azio kaj Afriko, amase memstariĝis novaj nacioj, kiuj sinsekve aliĝis al UN tiel ke ĝia tuta membraro atingis pli ol 120. Tagiĝo de la longe mallumaj partoj de la tero!

La Esperanto-movado ankaŭ traspertis tre diversajn fazojn. Kiam furiozis ŝovinisma ventego kaj regis malamika frostoj, la arbo de nia movado devis nur pacience toleri la forbloviĝon de la folioj, kelkafoje eĉ forrompiĝon de branĉoj. Sed ĝia trunko estis sufiĉe forta, subtenata de la radikoj disetenditaj profunde, por ke en la printempa sunbrilo denove ekkreskiĝu novaj branĉoj kun duoble abundaj foliaroj. Multe da vintroj ĝi travivis, sed tiom da printempoj kaj someroj ankaŭ. Jam nia arbo ne bezonas timi ian ajn atakon de la naturo. Ĝi atingis la maturecon laŭ diversaj vidpunktoj. Kiel lingvo, ankaŭ kiel sociala fakto. Rekono de Unesko. Oficiala instruado en diverslandaj lernejoj. Praktika uzado en poŝto kaj radio — televido. Grandega literaturo, kian devus envii la plejparto el la 122 membroŝtatoj de UN. ktp. ktp.

Dum la kvindek jaroj ni ja travivis tre multajn malfacilaĵojn, eĉ la plej korŝirajn, sed ni ĉion eltenis. Kaj estis vi, animo de majstro, spirito de Zamenhof, kiu ĉiam ame gvidis nin en tiu eltenado. Kara majstro, vi mortis korpe antaŭ kvindek jaroj, sed neniam mortas en nia memoro. Ne nur en nia memoro, sed fakte en la spirita mondo vi vivas eterne, laŭ nia firma kredo.

Akceptu nian sinceran dankon pro via mirinda elpenaĵo, kiun vi donacis

Kiel Konservi Mondpacon

—Konkreta Propono por kreo de Konstanta Mondpolicarmeo surbaze de Individuaj Volontuloj—

Akiko Nagata

Tiu ĉi traktato gajnis la Unuan Premion en la Konkurso de Traktatoj, okazigita de la Japana Unuiĝo de Mondfederalistoj, sub la aŭspicioj de la Asahi Ĵurnalo kaj la Japana Brodkasta Korporacio (NHK), por memorigi la 20-jaran datrevenon de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la 12-an Kongreson de la Monda Asocio de Mondfederalistoj.

Partopreno en la Konkurso estis limigita al gejunuloj malpli ol 35-jaraj. La temoj de traktatoj estis: “La Unuiĝintaj Nacioj kaj Mondfederalismo” aŭ “Kiel konservi mondpacon”.

Partoprenis la Konkurson entute 176 gejunuloj, kies verkaĵoj submetiĝis al la ekzameno de juĝkomisiono konsistanta el 8 membroj, inkluzive de d-ro Hideki Jukaŭa, prezidanto de Monda Asocio de Mondfederalistoj. La juĝkomisiono aljuĝis la unuan premion al f-ino Akiko Nagata. Ŝian traktaton ni esperantigis kaj prezentas ĉi-sube.

F-ino Akiko Nagata naskiĝis en Manĉurio en 1936, diplomigis ĉe Huĵi Virina Kolegio en Sapporo, Hokkaido, pri angla literaturo. Ŝi estas esperantistino jam de pluraj jaroj. Ŝi nun deĵoras kiel asistanto ĉe la Instituto por Katalizaj Studoj de la Hokkaido Universitato.

Ŝia patro estas profesoro de la inĝenierarto ĉe la Muroran Teknologia Universitato. De la infaneco ŝiaj gepatroj instruis al ŝi, ke “la mondo estas unu”, kaj tio igis ŝin aliĝi al la mondfederalista Movado, kiam ŝi estis ankoraŭ 17-jara knabino.

Kiel la unuapremiito ŝi estis delegita al la 12-a Kongreso de la Monda Asocio de Mondfederalistoj, kiu okazis en San Francisco en junio 1965.

al ni, al la homaro. Akceptu nian elkoran respekton pro la belegaj modeloj, kiujn vi montris, per la tuta vivo, ne nur kiel ia aŭtoro de lingvo, sed kiel homo la plej homama; ne nur kiel ia idealisto, sed ja kiel realisto laŭ la bela senco de la vorto, ĉar vi ĉiam serĉadis kaj trovadis konkretajn, realajn rimedojn por efektivigi la idealon.

La plej nobla animo de majstro, estu paca kaj feliĉa en la gloro de Dio kaj ĉiam helpu nin, ke ni, Esperantistoj kaj homaranistoj de la tuta mondo, viaj disĉiploj kaj gefiloj, harmonie kaj efike kunlaboradu, utiligante ĉiun eblan ŝancon kaj rimedon, neniam perdante kuraĝon kaj entuziasmon, sed ĉiam pie aŭskultante al via voĉo el la ĉielo, el la tero.

E. Ito

I Enkonduko

La krizo de Kubo en la aŭtuno de 1962 akre konsciigis al ni la fakton ke ni, kiel homaro, partoprenas komunan sorton. La diplomatio de la grandaj potencoj, bazita sur “ekvilibro de potencoj” aŭ “ekvilibro de terurismo” kaŭzis eksterordinaran vastigon de nukleaj armiloj, kaj jen ekaperas tia paradokso, ke mondmilito iĝas neebila. La problemo estas ke, ĉar tiuj ĉi nukleaj armiloj estas en la manoj de la suverenaj ŝtatoj, ni neniam estos liberaj de ĉiuj eblaj danĝeroj, kiuj povos evolui de internaciaj konfliktoj. Pro la sinsekvaj lokaj militoj en diversaj partoj de la mondo kaj la daŭra ĉeesto de tensio internacia, malgranda miskalkulo povus kaŭzi grandan danĝeron, kaj, ĝis nun estis pluraj okazoj de misinterpretado de radaro, kiuj preskaŭ elklikigus mondan militon. Tio nur signifas, ke ni ne plu povas lasi la

mondon antaŭeniri laŭ sia propra inercio.

En tia cirkonstanco, la nuna prikonsidero pri “Kiel konservi paco” devas direktiĝi ne nur al la konservado de la nuna pozicio, kia ĝi estas, sed al la neevitebla problemo, kiel savi la homaron, kiu rajtas transvivi la krizon.

Ĉar la krizo de hodiaŭ estas la rekta rezulto el la disvolviĝo de armilaro, la espero por la pluvivado de la homo devas apogiĝi, super ĉio, al la senarmigo de ĉiuj nacioj. Tamen neniam senarmigo estus ebla sen la provizo de rimedoj ĝin devigi. Nacioj facile alprenus rearmadon, krom se ni starigus leĝan ordon sub supernacia aŭtoritato. Ni povas diri, do, ke la starigo de mondregistaro sub federala sistemo estas necesega por monda paco estonta.

La nuna traktaĵo celas, en tiu ĉi rilato, demandi kaj konsideri, kio estas la plej bezonata afero por garantii sekurecon por la homaro, kaj kiel ni povos ĝin atingi.

II Plifortigo de la Unuiĝintaj Nacioj

— Unua paŝo al la Monda Organizo —

Okaze de la Korea Milito en 1950, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj akceptis la rezolu-

cion nomatan “Kolektiĝo por Paco”, kiu enhavis kondiĉon, ke, se la Konsilio de Sekureco estos malhelpata per

la vetoo plenumi la propran respondecon por la subteno de internacia paco kaj sekureco, la Ĝenerala Asembleo mem povos kunveni en “eksterordinara speciala sesio” por fari necesajn rekomendojn al la membroŝtatoj pri kolektivaj antaŭrimedoj, inkluzive la uzon de armeo.

La Ĝenerala Asembleo, kvankam reprezentanta la publikan opinion de la mondo, ricevas nur duagradan rangon rilate al la subteno de paco kaj sekureco en la mondo (laŭ art. 24 de UN-Ĉarto). Tamen dank’ al la dirita rezolucio, ĝi kapablas transpreni la respondecon de la Konsilio de Sekureco en la okazo se ĉi tiu estus en plena stagnado.

Tie ĉi ni povas vidi la decidiĝon de la membro-ŝtatoj, kiuj volas klopodi eĉ per tia nenormala formo, iel kompensi la nesufiĉan funkciadon de la Unuiĝintaj Nacioj kiel packonservanta korporacio.

Tiamaniere, kiam ajn U.N. frontas kontraŭ ia problemo, ĝi pligrandigas sin por esti pli kaj pli universala per ekrompo de sia propra ŝelo. Ni ne povas ne vidi la konkretan ateston, ke la klopodoj estis farataj por evoluigi el tiu provizora organizaĵo, starigita jam antaŭ la ekapero de atombomboj, sub kolektiva sekureca sistemo per suverenaj ŝtatoj, en mondan organizaĵon kiu havas policaron sub ĝia direktado.

— Malarmado kaj ĝia ebleco —

La Ĝenerala Asembleo en 1959 unuanime adoptis la rezolucion ke ĉiuj nacioj devas kunlabori direkte al ĝenerala kaj totala malarmado. Tiam UN havis 82 membro-ŝtatojn. La rezolucio tekstis : en la espero savi la nunan kaj estontajn generaciojn el la danĝero de pereiga milito kaj kun la aspiro fine ĉesigi por ĉiam la armadkonkuron, kiu estas granda ŝarĝo por la homaro, kaj ankaŭ utiligi la ŝparitajn materialojn por aliaj celoj utilaj al la homaro, ĉiuj nacioj devas efektiviĝi malarmadon sub efika internacia kontrolo.

Sekvante tiun agadplanon de U.N., oni komencis fari diversajn studojn kaj proponojn por malarmado. Ne estas troigo diri, ke la tuta mondo nun deziras malarmadon. Kial do, malgraŭ tiu fakto, neniuj projektoj por malarmado povas facile efektiviĝi ?

Kiel unu el la baroj, ni povas mencii la fakton, ke la Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ forbaras la aliĝon de Ĉinujo, kiu havas tiel vastegan landon kaj grandnombran popolon, kaj kiu fine sukcesis produkti nukleajn armilojn. Plie, Usono estas

timema pri la enlandaj ekonomiaj sekvoj pro malarmado, ĉar ĝia ekonomia forto grandparte dependas de la sindefenda buĝeto ; kaj cetere multaj nacioj ne havas grandan fidon je la forto de kontrolo kaj sekurecaj sistemoj aŭ dum aŭ post la malar-migo.

Nu, rilate la problemon de la ekonomiaj postefikoj de malarmado en Usono, raporto eldonita en 1962 de la Usona Fako por Kontrolado de Armiloj kaj Malarmado konkludas, ke la usona ekonomio povus toleri malarmadon.

Sekvas la problemo de la kontrola kaj sekureca sistemoj : la sola solvo

estos nenio alia ol la starigo de la Pacarmeo de U.N., kiel agnoskita en “la interkonsento de McCloy-Zorin” en 1962. Krome, estis principe konsentite ke la procedo de malarmado antaŭiru la starigon de la Pacarmeo de U.N., kiu respondecas pri la garantio de sekureco de la nacioj; sed praktike, ĉar la nacioj ne kuraĝus sin malarmadi sen certiĝo pri sekureco, tial la starigo de Konstanta Policarmeo de U.N. fakte devos antaŭiri la procedon de malarmado.

Kiel jam priskribite, estas nepra urĝa bezono starigi la Konstantan Policarmeon. Kiel do ĝi povos esti starigita ?

III Starigo de la Policarmeo de U.N. en komparo kun la japana Meĵi-Restaro

Malgraŭ ke en Japanujo la feŭda reĝimo de l’ Edo-epoko estis stabila dum du jarcentoj sub la nacia politiko de izoliteco for de aliaj landoj, ĝi facile rompiĝis pro la nov-epokaj ondoj albordiĝintaj el aliaj landoj, kaj la Meĵi-Restaro okazis 15 jarojn post kiam Usono sendis al Japanujo eskadron gvidatan de Komodoro Perry por postuli komercan interrilaton. Sub la gvido de nova registaro multaj kuraĝaj reformoj estis fari-taj ; unuavice per *Haihanĉiken* (nuli-

go de la malnova klansistemo kaj la establo de nova administracia sistemo kun la fondo de “ken” aŭ prefektujoj) kaj *Hanpeiseiri* (malorganizo de feŭdaj armeoj), tiel ke la unuecigo de la lando rapide progresis. Tiele, unuigita sub la nova registaro, Japanujo kreskis en modernan ŝtaton.

Rezulte de tio, la nuna epoko ne plu vidas iun ajn militon aŭ perfortan konflikton enlandan en Japanujo. Neniu prefektujo havas militan povon. Ekzistas nenia bezono por

interprefektuja milito. Antaŭ unu jarcento estis senfina serio da militoj kaj konfliktoj en la lando, kaj la homoj en tiuj tagoj tute ne povis imagi la nunan senmilitan situacion en Japanujo.

La svisa historio kaj la usona estas ĝenerale rekonitaj ke ili valoras pristudon por federismo.

En la moderna historio de Japanujo, precipe dum la Meiĵi-restarigo, kiu estis revolucia periodo en Japanujo, ni trovas situacion similan al tiu, en kiu staras la nuna mondo. Do ne estos senutile rigardi kelkajn aspektojn de la Meiĵi-restarigo, por ke ni konsideru pri la estonta funkcio de U.N. por la mondpaco.

A — La alianco de ĉefaj klanoj en la antaŭvespero de Meiĵi-restarigo —


Kiam la Bakufu (ŝoguna registaro) de Tokugaŭa estis jam kliniĝanta, la klanoj de Sacuma kaj Ĉooŝuu, kiuj sekrete okupiĝis en eksterlanda komerco, kontraŭ la nacia politiko de izoleco, subite potenciĝis; kaj kun la financa potenco, kiun ili akiris per tiu komercado, tiuj klanoj ekipis sin per siaj propraj armeoj por la celo pligrandigi sian aŭtoritaton kontraŭ la Tokugaŭa-reĝimo. La klano de Sacuma estas speciale notinda, ĉar en la jaro 1865, t.e. ĝuste antaŭ cent jaroj, la armiloj, kiujn ĝi importis ĉe Nagasaki (la sola haveno konservita kiel fenestro por rigardi la eksteran mondon), okupis pli ol la duonon de la tuta kvanto de la importitaj armiloj de la Tokugaŭa Bakufu kaj de ĉiuj klanoj.

Plie, la klano Sacuma iniciatis

kaj antaŭenpuŝis interklanan komercadon, se ne internacian; kaj la feŭdestroj en sudokcidenta Japanujo, kiuj ne kontentiĝis per vartado de sia sendependeco, enferman sin en la interno de sia feŭdo, alprenis la politikon sin ligi unu kun alia por sia komuna bono. Kaj en 1866 oni kontraktis la Sacuma-Ĉooŝuan Traktaton, kiu estas interliga traktato por reciproka milita helpado. Laŭ tiu traktato, la klano de Sacuma rifuzis la peton de la Tokugaŭa Bakufu ekspedi sian armeon por ataki la klanon de Ĉooŝuu, kiu kontraŭstaris la politikon de la ŝoguno.

Tiu milito inter la Tokugaŭa Ŝoguno kaj Ĉooŝuu (en 1866) finiĝis kun la venko de la lasta. Post tiu sperto, la feŭdestroj en sudokcidenta Japanujo, speciale la klanoj de Sacuma kaj Ĉooŝuu, gajnis grandan

Forpasis Julio Baghy



Julio Baghy (1891—1967)

La 18-an de marto s-ro Julio Baghy, la amata poeto de Esperantujo kaj ankaŭ longjara kunlaboranto por nia revuo, forpasis en Budapeŝto post multjara suferado de malsano. La enterigon, kiu okazis de la 14-a horo la 25-an de marto ĉeestis pli ol mil hungaraj kaj ali-landaj gesamideanoj. La ceremonio, oficiale prizorgita de Hungara Esperanto-Asocio, daŭris proksimume tri horojn, ĉar sonis multaj funebraj paroloj.

memfidon je sia modernigita militforto kaj financa potenco. Kaj la du klanoj, jam ne kontentaj resti en la kadro de sia inter-klana alianco, komencas sin enpuŝi en la centran

Lia korpo nun ripozas en la tombejo de Farkaszét, en tre bela ĉirkaŭaĵo de Buda, kie kutime estas enterigitaj la plej elstaraj personoj de la hungara kultura vivo.

La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno donis la nomon “Salono Julio Baghy” al la plej granda el kvin salonoj en la Muzeo.

Ni esprimas nian sinceran kondolon al la postlasita familio, kies paĉjo estis la Paĉjo por la tuta Esperantujo !

(La informojn ni dankas al nekrologo en Heroldo de Esperanto kaj al privata letero de d-ro Balla Ignác al ni.)

Red.



La enterigo la 25-an de marto

administradon de la lando. La klanoj de Sacuma kaj Ĉooŝuu estas kompareblaj al la nuntempaj potencoj de la mondo.

(daŭrigota)

Du Reprezentantoj de Oomoto-Junularo al la 52-a U. K.

Kiel en la pasinta jaro, ankaŭ en la nuna la Oomoto-Junulara Organizo delegos du gejunulojn en la venonta somero, ĉiŝoj al Tel Aviv, Israelo, kie okazos la 52-a Universala Kongreso de Esperanto.

La 12-an de marto tri kandidatoj estis ekzamenitaj kaj, post detala esplorado, en la komenco de aprilo la OJO decidis elekti por la dua delego jenajn geesperantistojn :


S-ro Kunimaro Kakehi kaj f-ino Sumiko Gotoo.

S-ro Kakehi, 29-jara, el la urbo Ajabe, deŝoras ĉe Eksterlanda Fakoj de Oomoto, okupas sin ĉefe kiel redaktoro de la revuo "Nova Vojo", nun eldonata ĉiumonate de Esperanto-Propaganda Asocio ; esperantisto de 4 jaroj, li estas fervora en la amas-komuniko pri nia afero, sukcesas varbi lernantojn per siaj artikoloj en japanlingva gazetaro. Lia patro, s-ro Kijozumi Kakehi (1893~1960), estis unu el la pioniroj de esperantismo en la tendaro de Oomoto.

F-ino Sumiko Gotoo, juna kaj ĉarma, el Osaka, estas oficistino ĉe Jahata Ŝtalindustria Kompanio ; ano de Osaka Esperanto-Societo, ŝi lernas esperanton de du jaroj, kaj tute energie post la UK en Tokio, 1965.



F-ino S. Gotco



S-ro K. Kakehi

Ambaŭ ekveturos meze de julio, kaj prenos la vojon tra Siberio, Varsovio (por viziti la tombon de d-ro Z.) kaj Vieno (por la IEMW) por fine alveni en Tel Aviv. Ili partoprenos, post UK, ankaŭ la 23-an Kongreson de TEJO. Survoje hejmen ili vojaĝos aparte, f-ino Gotoo tra la nordaj landoj de Eŭropo, s-ro Kakehi laŭlonge de la sudaj landoj de Azio, per ŝipo.

La vojaĝontoj nun okupas sin en preparado, kaj tagordigo de la vojaĝplano ; sekve la redakcio povos publikigi ilin en la venonta n-ro. En la nomo de OJO kaj la delegotoj mem, ni tamen jam nun petas al niaj legantoj, ke ili estu afablaj por aĝrabligi al niaj reprezentantoj la vojaĝon. Certe ili mem baldaŭ skribos al personoj, kies helpojn ili speciale devos peti dum la vojaĝo.

Mia Vizito al Aŭŝvic

— Kiom da personoj partoprenos la ekskurson al Auschwitz? (elparolu Aŭŝvic; en pola lingvo Oswiecim).

Nur deko da personoj levis la manon. La plimulto de la postkongresanaro ne volis aŭ ne kuraĝis viziti lokon kun tiel terura historio.

Por tiel malmultenombra areto da ekskursantoj ne indis lui specialan omnibuson, kiu tre simpligus la vojaĝon. Oni decidis, do, veturi per fervojo.

Frumatene ni foriras de Krakovo, historia urbo, kie okazis la postkongresa ekskurso de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto. Antaŭ la stacidomo de Aŭŝvic estis jam atendanta nin la loka delegito de U.E.A., kiu ĝentile ludis por ni la rolon de ĉiĉerono.

Loka omnibuso transportis nin al la muzeo, kiu okupas nur parton de areo da konstruaĵoj, eksaj polaj kazernoj, kiujn dum la dua mondmilito la germanaj invadintoj destinis por koncentreja tendaro.

La plimulto el tiuj konstruaĵoj estas malplenaj. En unu, kie troviĝis la administracio de la koncentreja tendaro, estas nun katolika kapelo.

En aliaj funkcias la muzeo, kiun ni tuj vizitis.

Ni devas iom hasti vidi la tutan materialon, kiu estas tie ekspoziciata en grandaj salonoj, kaj ilustras pri la plej monstraj krimegoj registritaj dum la tuta homa historio, plenumitaj antaŭ nur tre malmultaj jaroj. Pli detalan priskribon de tiu ĉi muzeo mi faros poste.

Tiu ĉi koncentreja tendaro estas tute ĉirkaŭita de duobla pikildratreto antaŭe elektrigita. Laŭ la grandeco de la uzitaj izoliloj, oni povas facile konjekti pri la altega voltkvanto de ties elektra kurento. Kompreneble, la afliktegitaj malliberuloj rigardis tiun elektrigitan pikildratreton kiel sian lastan kaj superegan esperon. Sufiĉus nur kuri al ĝi kaj ĝin tuŝi por ĉesigi ĉiujn suferojn. Sed, ho ve! Eĉ tiu trista espero estis malpermesata al ili. Ĉar la ektuŝo de la elektrigita pikildratreto kaŭzis, krom la tujan morton de la tuŝanto, okazan kontakton, kiu difektis la instalaĵon, la S.S. (germanaj torturantoj kaj murdistoj) ricevis severan ordonon ĉiel eviti, ke la torturatoj serĉu tiamaniere la liberigon. Tiuj, kiuj kuris al tiu direkto

estis, do, tuj mortpafitaj de la S.S.

La enirejo al tiu koncentreja tendaro kaj ĝia tuta perimetro estas gardataj de turoj kaj eĉ subteraj observejoj, kie la S.S. tage kaj nokte zorgis, ke neniu forkuru.

Fakte la forkurado estis neebbla pro la eksterordinaraj antaŭzorgoj kaj antaŭrimedoj fare de la S.S. Tial, dum la longaj jaroj de funkciado de tiu koncentreja tendaro, kie 4.300.000 da senkulpaj homoj estis malrapide malsatigitaj kaj torturitaj kaj poste gasumitaj kaj bruligitaj, nur 30 personoj sukcesis forkuri.

Inter la du pikildratretoj estas sufiĉa spaco, kiu permesis la cirkuladon de la gardostarantoj; kaj laŭ ĝia tuta longo grandaj elektraĵoj, unu apud la alia, lumigis dumnokte la scenon per tragedia heleco.

Super la enirejo mem oni ankoraŭ vidas germanlingvan surskribaĵon, kiu estas terura sarkasmo: "Arbeit macht frei" (= La laboro liberigas). Ĉar la germanaj torturantoj kredigis siajn viktimojn je la alveno, ke ili estis internigitaj tie nur por labori.

Poste ni vidas vastan ĉambregon, kie, antaŭ ilia murdado, la viktimoj estis devigataj tute senvestiĝi kaj depreni de si ĉiujn objektojn: lambastonojn, okulvitrojn, artefaritajn dentarojn, protezajn okulojn, krurojn kaj manojn, k.t.p. Tiuj objektoj amasiĝis sur la planko formante monte-

tojn, kiujn la germanoj poste utiligis diversmaniere (oro, arĝento, juvelŝtonoj, perloj kaj aliaj multvaloraj aĵoj estis zorge gardataj en la administracio de la tendaro). Kiam la viktimoj estis jam absolute nudaj, ĉiuj kune, viroj, virinoj, infanoj kaj suĉinfanoj estis puŝataj en la gasĉambron pere de pied- kaj kolbofrapoj. La S.S. profitis la okazon por kruele moki la murdotojn:

— Enirante en ĉi tiun ĉambron bonvolu enspiri plenbruste ĉar tio tre bone efikas sur la sanon. Spiraj ekzercoj ja estas konsilindaj.

Aŭ jene:

— Nia "Führer" (= gvidanto) tre amas vin. Pro tio li volas desinfekti vin por ke vi fartu pli bone.

La S.S. aplaŭdis siajn proprajn "spritaĵojn" pere de brutalaj ridegoj kaj kelkaj el ili por sin plie amuzi fotografis la nudajn viktimojn en la ĝusta momento, kiam tiuj ĉi eniris en la gasĉambron.

(Poste, kiam la germanoj estis venkitaj en la milito kaj la S.S., timante punon pro iliaj krimegoj, mal-kuraĝe forkuris, multaj el tiuj foto-grafaĵoj estis kaptitaj de la liberigantaj armeoj kaj servis kiel nerefuteblaj dokumentoj por pruvi tiujn monstrajn krimojn. En la supremenciita muzeo kaj ankaŭ en alilokaj ni vidis pligrandigitajn kopiojn de tiuj foto-grafaĵoj.)

Nur du pordojn havas la vasta gas-ĉambrego: unu por eniri kaj la alia por eltiri la kadavrojn. Kiam ĝi estis plenŝtopita per homoj, ambaŭ pordoj estis hermetike fermitaj kaj samtempe fenestreto estis malfermita en la plafono tra kiu oni enĵetis ĥemian substancon nomitan “ciklono”, kiu, sub la influo de la varmo de tiom da personoj kunpremiĝintaj simile al sardeloj, baldaŭ eligis toksan gason. (En la muzeo ni vidis amason da malplenaj ladaĵoj, kiuj enhavis tiun substancon).

La viktimoj, kiuj bone sciis kial oni enfermis ilin tie, senutile eligis siajn lastajn malesperajn kriojn. La patrinoj per siaj korpoj vane klopodis protekti siajn karajn infanojn. Post kelkaj minutoj la dua pordo estis malfermita; la kadavroj estis ŝargitaj en ĉaretoj kaj portitaj al la apudaj kremaciaj fornegoj, kie en dek minutoj ili estis forbruligitaj. Ne ĉiam oni cindrigis nur kadavrojn. En multaj okazoj la viktimoj estis ankoraŭ vivantaj, duonasfiksiitaj per la gasoj, precipe la infanoj. Sed tio ne gravis. Ĉiujn korpojn, ĉu vivantajn aŭ ne, oni enmetis en la bruligujojn, kiujn oni tuj enŝovis en la fornegojn. Ok fornegoj konsistigas la Kremaciejon I, kiun ni unue vizitas, kaj du kadavroj estas la enhaveco de ĉiu fornego. Do, dek ses kadavroj estis samtempe forbruligitaj en nur 10

minutoj. Kompreneble, se temis pri infanoj la enhaveco estis pli granda.

La fornegoj funkciis seninterrompe, tage kaj nokte, kaj la akran odoron de la forbruligitaj kadavroj oni sentis je multaj kilometroj de distanco. Oni devis haste fari tiun “laboron” ĉar la murdotoj estis tre multenombraj kaj la enhaveco de la fornegoj tro limigita: “nur” 16 korpoj en ĉiuj 10 minutoj. Pro tio la germana registaro baldaŭ ordonis la konstruadon de alia tendaro je 2 kilometroj de distanco, kiu estas multfoje pli granda ol la unua kaj kiun mi priskribos poste.

La cindro de tiom da kadavroj (4.300.000 nur en Aŭŝvic) estis ŝargita en ĉaroj kaj forportita al la najbaraj kampoj por plenplenigi kavaĵojn kaj breĉojn. Kaj poste, kiam ne plu estis loko por tiom da cindro, oni ĝin tute simple ĵetis en la riveron. Tiamaniere la grundo de Polujo (ankaŭ de aliaj eŭropaj landoj, kie samtempe funkciis aliaj koncentrejaj tendaroj) estas laŭvorte sterkita kaj grasigita per centoj da miloj da tunoj de homaj cindroj. Kaj kiam la nunaj tieaj loĝantoj manĝas pecon da pano, ili ne nur simbole sin nutras per la brulrestaĵoj de la mortintoj.

La aliaj vizitantoj, jam sufiĉe ĉagrenitaj pro la viditaĵoj, foriris. Sed mi volis ĉion vidi. Tial mi petis al

nia ĉiĉerono, ke li akompanu min al Birkenau, la plej granda mortigejo, malproksima je 2 kilometroj.

Ni trairis nekulturitajn kampojn prezentantajn kavaĵojn kaj elstaraĵojn.

— Bonvole iom skrapu la teron,
— diris al mi mia akompananto.

Mi iom skrapis kaj eltiris multajn pecetojn de duonbruligitaj ostoj, kiujn mi pie enpoŝigis.

Ni baldaŭ vidis relojn kaj marŝis laŭlonge ĝis ni alvenis al la enirejo de la mortigejo.

Surskribaĵo ĉi tie ne estas. Sed certe en la tuta mondo oni neniam povus pli trafe ol tie ĉi apliki la famkonatajn versaĵojn de Dante :

Lasu ĉiun esperon

Vi, kiuj eniras. . .

Dum la Hitlera epoko, dum pluraj jaroj, ruliĝadis sur tiuj reloj miloj kaj miloj da vagonaroj plenŝtopitaj per judoj, precipe infanoj, virinoj kaj maljunuloj devenantaj de ĉiuj anguloj de Eŭropo kaj apartenantaj al ĉiuj socitavoloj. Je la alveno, malfermiĝis la pordego de la mortigejo kaj la lokomotivo enrulis la tutan vagonaron, sed restante mem ekstere ĉar nek la kondukisto nek la hejtisto devis vidi ĝian internon.

Mi vizitis la grandajn barakarojn, kie tiom da senkulpaj homoj tiel terure suferadis dum longaj monatoj kaj jaroj, ĝis ili finfine estis gasumitaj

kaj bruligitaj. Mi emocie palpis la lignajn bretaraĉojn, kiuj servis ilin kiel litoj kaj sur kiuj ili pasigis tiom da agonisendormajn noktojn. Kie ili estas nun ?

Jes, mi scias, kie ili estas. Mi ja ne forgesas la duoncindigitajn ostojn, kiujn mi ĵus elskrapis el la tero, nek la enhavon de la muzeo, kiun mi antaŭ momento vizitis. Al ili apartenis la montoj da tonditaj haroj, kiuj amasiĝas malantaŭ la montrafenestroj kaj kiuj griziĝas kvazaŭ ili estus vivantaj ; la suĉboteletoj, pupoj kaj ludiloj de la infanoj, kiuj neniam kreskis ĉar ili estis baldaŭ masakritaj pro la krimo esti juddevenaj ; la ŝuoj, vestoj, valizoj, pelvoj, dentbrosoj, glasoj, teleroj kaj aliaj necesaĵoj ekspoziciataj, kiuj silente rakontas al la vizitanto, ke iliaj posedintoj ne plu bezonas ilin ĉar ili estis elirigitaj tra la kamentuboj de la fornegoj.

Vesperigas. Jam la unuaj ombroj de la nokto etendiĝas sur la koncentreja kampo, kie la herbo denove kreskas. Mi haltas minuton antaŭ monumento, kiu rememorigas tiujn milionojn da martiroj kaj fine mi hastas al la stacidomo por reveni al Krakovo. . .

ANONCETO Por esperanta korespondado junaj esperantistoj sin anoncu al la aŭstra journalo (politike neŭtrala): "KLEINE ZEITUNG", Schonaugasse 64, A-8010 Graz, Aŭstrujo.

Ho, lasu min trankvile revi !

Ho, lasu min trankvile revi,
en lum', portata en mi, bani min,
rifuĝi for el mond', min levi
inspirflugile ĝis la kosma lim' !

Atendas transe senlimeco
Kaj eblo por forgesi pri la ter'
por ĝui en la eterneco
collongan ŝajnon de fiktiva ver'.

Ho, lasu min trankvile drivi
sur fabelmar' al suna sonĝhaven',
sur transa bordo pense vivi
en lando de miraĝoj sen katen' !

Ĉi infanlud' ne malutilas
al vi, tre sobraj estroj de l' real' ;
en ĝi konsola trompo brilas
por la fratar' dum migro sub fatal'.

Ho, lasu min trankvile kanti,
cikade ĉirpi sur la vivokamp',
somerhumore salti, dandi,
formikojn ridi pro prizorga ramp' !

Ne gravas grumblo de l' stomako ;
min nutras ja nektaro, ambrozi'
kaj lulas eĉ la korvograko,
se ravas min korsorĉa melodi'.

Ho, lasu min trankvile gastigi
ĉe fabla tablo en reĝpompa bril'
kaj orajn revojn verse rasti,
al senhavuloj ŝuti perlojn mil !

Spiritismo en Versoj

En grandvalora libro ĵus eldonita en Kioto, Japanujo, sub la titolo “Utaŝta Poemaro”, inter aliaj poemoj aperas unu kurso pri Spiritismo, en belaj versoj de nia londona kunfrato Harris William Holmes, Honora Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio.

En la unuaj strofoj li traktas la

eksperimentajn seancojn, okazigitajn en ruĝa lumo.

La Spirito Eskiba komunikiĝas kaj komencas doni pruvojn pri transvivado. Elkarniĝintaj amikoj kaj amikinoj aldonas identigajn pruvojn. Ili plezure rememoras epizodojn jam okazintajn inter ili kaj iliaj amikoj, tie ĉi sur la Tero.

Unu sinjorino el la spirita mondo sin ĝenas, ke ŝia filino pensas pri ŝi nur kiel pri kaduka kaj sulkohava maljunulino. Al ŝi estas penige rememori tian bildon. Ŝi ne plu estas tia, sed ŝi jam revigliĝis, ŝi jam estas juna, kaj ĝuas bonegan sanon kaj aktivecon. Manifestiĝas Spirito, kiu fraŭdis, perfidante la konfidon de sia

Mizeron bardan Muzo kaŝas
nebulvuale sur stelpolva voj’ ;
dum mi kantante migre pasas,
ne ĝanas dornopik’, nek hunda boj’.

Ho, lasu. . . Petoj vane spitas ;
pro propra voĉ’ nun surdas ĉiu di’,
blinduloj la vidantojn gvidas
en ĉi burleska farsa tragedi’,
kaj homa digno, mi jam scias,
nur vipe servas en la sanga pel’ ;
pri ĝi la sklavo fantazias,
en ĝia nom’ li murdas dum ribel’.

J u l i o BAGHY

NOTO : — ĉi tiu poemo, kiun ni elektis por la nuna n-ro senscie pri la forpaso de la poeto, fariĝis lia simbole bela Cigna Kanto.

— Red.

amiko, kaj Eskiba hezitas lin trakti laŭmerite. Fine, lia viktimo pardonas lin kaj esprimas al li bondezirojn por feliĉo, kaj li, kiu vivadis en la infero de la konscienciproĉo, nun sukcesas atingi trankvilon.

Kontraŭe, aliaj spiritoj venas memorigi nin pri tio, ke ili helpis nin dum niaj bezonoj kaj, pro tio, ili sentas sin feliĉaj en la spirita mondo. Ili konservas korinklinon al la parencoj kaj amikoj, kiujn ili postlasis ĉi tie.

Kelkaj protestas, kiam ni diras, ke ili jam mortis, ĉar ili ja sentas sin perfekte vivantaj kaj ne perceptas, ke ili jam ne posedas la fizikan korpon. La universaleco de la manifestiĝo de konsternitaj spiritoj havas grandan teoriant signifon favore de Spiritismo.

Poste, Eskiba foriras kaj transdonas la gvidadon de la laboroj al Helias, kies personeco estas tre malsama ol tiu de Eskiba. Li estas impone klera, sed humila. Lia ĉefa misio estas la kuracado de malsanuloj. Li faras bonegajn diagnozojn. Kun nenia informo de la malsanulo, li priskribas ĉiujn misfunkciojn de la organismo. Li modeste deklaras: “Mi vidas iomete pli ol vi, sed ne multe”.

Li kuracas ne nur fizikajn malsanojn, sed ankaŭ mensajn, psikajn kaj emociajn. Li insiste asertas, ke la

homo estas ia kunaĵo, kaj ke oni devas kuraci la kaŭzon, sed ne nur simptomojn. Sed oni povas kuraci nur kiam la malsanulo mem petas kaj helpas per sia peno. Li apartenas al granda nombro de kuracantoj, kiuj ĉiam povas helpi malsanulojn.

Li kuracas la obsedon kaj dangeŝajn reobsedojn, kiel instruis Jesuo, laŭ Luko 11 : 25 kaj 26.

Kiam Helias finis sian taskon, li adiaŭis kaj Eskiba reprenis la mediuminon por konversacii iom pli.

La lasta verso de la bela poemo estas la fama maksimumo de Descartes — “Cogito, ergo sum” — en eleganta Esperanta traduko.

En la sama volumo de poemoj aperas alia spiritisto, nia frato Kleber Halfeld, redaktoro de la revuo “O Médium” (La Mediumo), el la urbo Juiz de Fora. Lia kunlaboraĵo estas mirinda preĝo esprimanta la certecon, ke la Tero ŝanĝiĝos en feliĉan mondon, kiam la homo kleriĝos kaj preĝos kun fido.

Tiamaniere, kuras la mondon du poemoj de niaj spiritistaj fratoj, en bonega Esperanto.

La valorega libro venis al ni el la Imperio de la Leviĝanta Suno, de kie ni jam ricevis multajn belajn verkojn.

(El la revuo “Reformador”, N-ro de januaro ‘67 tradukis

Benedicto Silva)

Renkontiĝo en Hollywood

Ni, kelkaj amikoj, paŝadis, admirante la pejzaĝon de la Wilshire Boulevard, en Hollywood, kaj jen ni subite haltis antaŭ la trankvila Memoriam Park Cemetery, situanta inter nia vojo kaj la ĝardenoj de Glendon Avenue.

La bela loĝejo de la mortintoj prezentis grandan cirkuladon de Spiritoj liberiĝintaj de la fizika provado, kaj ni enris tien.

Interne, ĉio estis trankvileco kaj ĝojo.

La simplaj tomboj similis monumentojn konstruitajn al la paco, instigantajn al preĝado. Inter la arboj, kiujn la printempo freŝverde koloris, multaj Spiritoj iradis tien kaj reen, multaj el ili apogitaj unuj sur aliaj, kiel resaniĝantoj subtenataj de flegistoj, sur korto de agrabla kaj vasta hospitalo.

Ĉe vojangulo, alta pro la grundo, du ornamaj oranĝarboj gardostaris ĉe la enirejo de eta konstruaĵo konservanta la cindrojn de multaj homoj, kiuj estis paŝintaj en la Transmondon, sub la estimo de la homaro. Ĉe unu angulo mi legis la surskribaĵon: “Marilyn Monroe — 1926–1962.”

Surprizita, mi demandis al Clinton, unu el la amikoj nin akompanantaj:

— Ĉu kuŝas tie ĉi la mortintaĵoj de Marilyn, la kina stelo, kies historio konatiĝis eĉ al ni jam de longe elkarniĝintaj, en la Spirita Mondo?

— Jes — li respondis, kaj emfazis per signifoplena esprimo: — sed ne haltu ekzamenante ŝian funebran surskribaĵon. . . Ŝi estas vivanta kaj vi povas renkonti ŝin tie ĉi kaj nun. . .

— Kiel?

La amiko montris al foliriĉa ĉina ulmo, kies branĉaro konsistigas smeraldverdan rifuĝejon meze en la vasta enfermejo, kaj diris:

— Jen estas ŝi ripozanta, sendube en vizito por revigliĝo kaj rememoro. . .

Malmultajn paŝojn malproksime de ni, junulino elkarniĝinta sed ankoraŭ evidente malsana apogis sian blondan hararon sur la genuojn de simpatia virino, kiu ŝin protektis. Marilyn Monroe, ĉar tiu junulino estis ja ŝi, elmontris vizaĝon aliiĝinta kaj okulojn malgajaj. Informitaj, ke al ni estis permesite alparoli ŝin por kelkminuta konversacio, ni alproksimiĝis respektplenaj.

Clinton prezentis nin, kaj mi ekparolis :

— Mi estas unu amiko el Brazilo, kiu deziras aŭdi vin.

— Unu brazilano min serĉanta, post mia morto ?

— Jes, kial ne ? — mi aldonis.

— Via persona sperto interesas miliojn da personoj en la tuta mondo. . .

Kaj la dialogo daŭris plu :

— Sensukcesa sperto. . .

— Unu lecionon, eble. . .

— Je kio mi povus utili al vi ?

— Via vivo influis sur multajn vivojn kaj ni ŝatus ricevi eĉ mallongan sciigon de via flanko, por tiuj, kiuj admiras viajn filmojn kaj memoras vian distingitan ĉeeston en la mondo. . .

— Kiu ŝatus akcepti dolorkrion ?

— La doloro instruas. . .

— Mi estis virino kiel ĉiuj aliaj kaj mi ne havis tempon nek emon pensi pri filozofio.

— Sed, eĉ estinte tia, parolu. . .

— Bone ; diru, do, al la virinoj, ke ili ne trompiĝu rilate belecon kaj riĉaĵon, emancipiĝon kaj sukceson. . . Tio popularigas, kaj populareco estas trapezo, sur kiu raraj homoj sukcesas senĉese ludi moralan grandecon en la cirko de la ĉiutageco. . .

— Ĉu vi konsentas, tiamaniere, ke la virino devas resti ekskluzive en la hejmo ?

— Ne tiom. La hejmo estas ins-

titucio pri kiu prirespondas kaj la virino kaj la viro. Mi volas diri, ke la virino luktis dum jarcentoj por havigi al si la liberecon. . . Nun, kiam ŝi posedas ĝin, en la progresemaĵoj, estas necese lerni ĝin kontroli. La libereco estas bono postulanta administran saĝon, kiel okazas al la povo, al la mono, al la inteligento. . .

Mi pensis kelkajn momentojn pri la famo de tiu junulino, kiu sin prezentis al la tuta Tero, el tie mem, Hollywood, kaj mi aldonis :

— Miss Monroe, kiam vi aludas la liberecon de la virino, ĉu vi volas menciigi la seksan liberecon ?

— Speciale.

— Kial ?

— Ĉar, konkurante sen iu ajn malhelpaĵo pri la laboro de la viro, la virino ĝenerale opinias, ke ŝi havas la rajton pri ĉiuspeca sperto, kaj, per tio, ŝi preskaŭ ĉiam kompromitas la bazojn de la vivo. Nun, kiam mi revenis al la spirita mondo, mi komprenas, ke reenkarigi estas lernejo tre malfacile funkcia por la bono, ĉiuforte kiam la virino deflanke de la devo ami, inter siaj filoj, la moralan laboron al kiu ŝi estas vokita.

— Vi deziras diri, ke la sekso. . .

— . . . povas esti komparata kun la pordo al la surtera vivo, kanalo de renaskiĝo kaj renoviĝo, kapabla esti gvidata al la lumo aŭ al la mal-

lumo, laŭ la direkto, kiun oni donos al ĝi.

— Ĉu estus eble al vi iom pli klarigi tiun aferon ?

— Mi ne havas esprimokapablon por paroli pri tio, kun la necesa klareco ; sed mi celas aserti, ke la sekso estas ia speco de sublima vojo por la manifestiĝo de kreanta amo en la kampo de la fizikaj formoj kaj en la sfero de la spiritaĵoj verkoj. Kaj, se ĝi ne estos respektata per saĝa zorgado de la valoroj, el kiuj ĝi konsistas, ĝi estos nature konfuzita de la animaligitaj inteligentoj ankoraŭ troviĝantaj sur la plej malaltaj niveloj de la evoluado.

— Miss Monroe, — mi ravita diris, aŭdinte ŝiajn opiniojn —, mi devas certigi al vi, ne sen profunda estimo al via persono, ke la memmortigo ne ŝanĝis vian klarvidemon.

— La tezo pri mia memmortigo ne estas efektiva, kiel ĝi estis komentita — ŝi emfazis, ridetante. — La vivantoj diras pri la memmortintoj tion, kio venas al ili en la kapon, kaj la mortintoj ne povas doni al ili la ĝustan respondon, ĉar tiuj ĉi nescias, ke ili mem, la vivantoj, troviĝos pli malfrue antaŭ tiu sama problemo. . . La elkarniĝo trafis min per terura obseda procedo. Verdire, en tiu epoko mi troviĝis profunde deprimita. Ekde la infanaĝo mi suferis la sortoŝanĝojn rilate la sentimenton, ĉar mi ne sciis

regi mian liberecon. . . Post teruraj noktoj, dum kiuj mi sentis min frenezigi pro manko de orientiĝo kaj fido, mi englutis, preskaŭ duon-senkonscia, mortigajn elementojn min elpelantajn el la korpo, supozante, ke mi trinkas simplan dozon de dormigaj piloloj. . .

— Ĉu vi povis dormi dum la granda transiro ?

— Neniel. Kiam mia guvernantino maltrankvile frapis sur la pordon de mia ĉambro, ĉar ŝi vidis lumon, mi subite vekigis el la duondormo al kiu mi min konfidis, kaj mi sentis kvazaŭ mi estus samtempe du personoj. . . Mi kriis timigita, ne sciante tuj identigi min, ĉar mi sukcesis moviĝi kaj paroli apud tiu ALIA FORMO — la karna vesto, kiun mi estis lasinta. . . Bedaŭrinde por mi, en la ĉambro troviĝis kelkaj elkar-niĝintaj malbonfarantoj, kiuj, poste mi eksciis, ruinigis miajn energiojn. Kun nepriskribebla angoro mi akompanis tion, kio okazis al mia sendefenda korpo ; tio tamen konsistigas ĉapitron de mia sufero, ĉapitron, kiun, mi petas vin, permesu ne rememori. . .

— Ĉu vi povos klarigi al ni kial vi spertis tian akran percepton, ĝuste en la momento kiam la morto ordinare kaŭzas anestezon kaj malviglecon ?

— Efektive, mi ne intencis fuĝi

el la ekzistado, sed, intime, mi ne-
rekte enfalis en la memmortigon. Mi
eluzis miajn fortojn pro la arto kaj
fordonis min al ekscesoj, kiuj detruis
miajn favorajn okazojn por nobliĝo. . .
En la lastaj tempoj ĉi-tieaj amikoj
informis min, ke post la elkarniĝo ne
estis eble al mi ripozi dum mi ne
liberiĝis el la pereiga influo de la
vampirigantaj Spiritoj, al kies celoj
mi aliĝis pro nekapablo distingi la
leĝojn regantajn la ekvilibron de la
animo.

— Mi komprenas, ke vi nun dis-
ponas pri valoraj konoj pri la ob-
sedo. . .

— Jes, hodiaŭ mi kredas, ke la
obsedo, inter la homoj, estas turmento
multe pli terura ol la kancero. Ni
petu al dio, ke la scienco en la mondo
decidu studi kaj solvi ĝiajn proble-
mojn. . .

La intervjuito montris signojn
de laciĝo, kaj, laŭ la okuloj de la
flegistino, kiu tenis ŝian kapon sur sia
intergenuaĵo, mi rimarkis, ke mi ne
rajtas daŭrigi la interparolon.

— Miss Monroe — mi konkludis
—, tiu ĉi renkontiĝo en Hollywood
faris al mi plezuron. Ĉu ni povas scii
kiuj estas, nuntempe, viaj planoj por
la estonteco?

Ŝi vidigis novan rideton, en kiu
miksiĝis la malĝojo kaj la espero, ŝi
silentis dum kelkaj momentoj kaj
asertis :

— Kiel malsanulino, unue mi
volas plibone fartigi min. . . Poste,
kiel lernantino en la vivo-lernejo, mi
bezonas ripeti la lecionojn kaj la
provojn ĉe kiuj mi frakasis. . . Nun
mi ne devas nek povas celi ion alian
ol reenkarniĝi, lukti, suferi kaj lerni
denove. . .

Mi diris kelkajn mallongajn fra-
zojn de danko kaj adiaŭo, kaj ŝi
svingis ŝian etan manon, adiaŭante.
Tuj poste, mi skizis ĉi tiujn notojn
kvazaŭ ia raporto, por pensi pri la
benoj de la Evangelia Spiritismo kaj
la bezono ĝin disvastigi.

(Mesaĝo ricevita per la mediumo
Francisko Cândido Xavier, la 29-an
de Aprilo 1966, vespere, en Los
Angeles, Usono).

(El la spiritisma revuo REFOR-
MADOR, N-ro Julio 1966)

Trad. *Benedicto Silva*

Redakcia Noto : — Pri la brazila
mediumo Francisko Cândido Xavier
oni povas legi, en N-ro Jul-Aŭg. 1963
de “Oomoto”, biografian artikolon el
la plumo de S-ro Ismael Gomes Braga.

Anonceto

La Nord-Okcidenta Amerika Esperanto-
Konferenco okazos la 16-an, 17-an, 18-an de
Junio 1967 en la ŝtato de Washington ĉe la
urbo tiom ŝatata, ke oni ĝin nomis dufoje
— Walla Walla. Ĉiu Esperantisto, aŭ via
saluto, estas bonvena. Walla Walla Esp-
eranto Society, 1351 Grant St. Walla Walla,
Wash. 99362 USA.

Raporteto pri mia vizito en Kalifornio

De la 2-a ĝis la 20-a de decembro, 1966, mi vizitis por la dua fojo post tri jaroj la esperantistojn en Kalifornio, Usono. Jen sekvas konciza raporteto pri tio.

2-8 dec. San-Franciska Regiono

Dum tiu ĉi semajno mi gastloĝis ĉe ges-roj William H. Schulze, Hillsborough, kaj havis sufiĉe da okazoj labori por esperanto-movado. Unue mi partoprenis la Zamenhof-Festobankedon de SANFREO, okazinta la 3-an vespere ĉe Continental Lodge, San Francisco, kun 70 ĉeestantoj. Tie oni aranĝis la montradon de la 16-mm. filmo kun koloro kaj esperantlingva komentario pri "Oomoto-Internacia Festivalo", kaj festparoladon de mi.

Okazis vizitoj al lernejoj en tiu regiono, en kiuj esperanto estas instruata de esperantistaj geinstruistoj. Mi menciis nur la nomojn de la lernejoj kaj geinstruistoj.

La Honda — La Honda School (s-inoj M. C. Sears kaj R. Lightcap) San Mateo — Lakeshore School (s-ino G. Notowitz)


Turnbull School (s-ino D. Vallon)

Horrall School (s-ino B. Vandenburg)

Knolls School (s-ino G. Harris)

Sunnybrae School (s-ro H. Schicket)

Millbrae — Spring Valley School



Ĉe Zamenhof-Festo, San Francisco

(s-ino M. Rees)

La gradoj de la gelernantoj, kiuj lernas esperanton, estas variaj de la unua ĝis la sesa, kaj mi parolis al ili pri Japanujo, instruis japanan kanton (esperantigitan) kun akompano de facila gimnaskito, kaj respondis al multaj demandoj de la gelernantoj kaj geinstruistoj. Ĉiam akompanis min ges-roj Schulze por veturigado kaj interpretado.

Krome, mi vizitis du vesperajn lernejojn por plenkreskuloj en

Redwood City — Sequoia High School

San Francisco — Galileo High School

kaj gvidis la esperanto-klason respektive dum du kaj duona horoj.

Kelkajn vesperojn mi pasigis aŭ ĉe amika festeno aŭ por intervjuo kun

ĵurnalistoj aŭ por viziti prezentaĵon
“Holiday on Ice”, ktp.

9 — 14 dec. Los-Angela Regiono


Min gastigis dum 6 tagoj ges-roj Charles E. Peterson, delegito de UEA en Downey. Tie ĉi mi ne faris tiel oftajn vizitojn kiel en la lasta regiono, sed mi havis multe da kontaktoj kun esperantistoj.

Zamenhofa Festobankedo okazis, sub la aŭspicio de Los Angeles Esperanto-Klubo, ĉe Chapman Park Hotel, Los Angeles, vespere de la 10-a, en kiu kunvenis 80 personoj. Ili rigardis la filmon pri Oomoto-Festivalo kaj aŭskultis mian paroladon pri la esperanto-movado en Japanujo kaj pri la Oomoto-movado.

Mi ĉeestis alian Zamenhofan Bankedon en Covina, vespere de la 14-a, kiun aranĝis San Gabriel Vally Esperanto-Club kun siaj 40 membroj. Tie mi denove havis la okazon paroli pri la japana esperanto-movado kaj respondi al multaj demandoj pri Oomoto.

Foje dum mia restado mi havis la feliĉon renkontiĝi kaj interparoli tre amike kun veteranaj esperantistoj-pioniroj en Usono, nome, ges-roj Parrish, ĉefdelegito de UEA, s-ro Baker, eldoninto de la unua E-kurso-libro en Usono, kaj ges-roj Chomette, kiuj ĉiuj interesis min per vigla rakontado pri diversaj historiaĵoj kaj valoraj travivaĵoj esperantistaj.

Ekster mia esperantista agado, mi vizitis Long Beach, banloko, Disneyland, grandega ludejaro, kaj partojn de la urbetaro Los Angeles.



Ĉe Turnbull Lernejo

S-ro Peterson estis ĉiam bonkvallita ŝoforo kaj gvidanto por mi en ĉiuj okazoj. En tiu ĉi regiono oni publikigis pri mia vizito kaj pri esperanto en du taggazetoj.

15–20 dec. San-Diega Regiono

La gastiganto en San Diego dum 6 tagoj estis ges-roj Francis E. Helmuth, prezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, kaj ĉarma Lisa.

Okazis ĉi tie du oficialaj aranĝoj me more de Zamenhofa Festo. La unua havis la lokon en kunvenejo de First National Bank of San Diego, la 15-an de dec. kun 25 ĉeestantoj. La filmo pri Oomoto-Festivalo estis montrita kaj ĝin sekvis mia parolado kun angla traduko de s-ro Helmuth. La duan aranĝon ĉeetis ankaŭ 25 personoj en la domo de ges-roj Helmuth, la sekvintan vesperon. Lisa kaj mi prezentis teatraĵeton “Fajro, fajro”, kiu helpis gajigi la bankedon. Bonŝance vizitis la bankedon aŭstraj ges-roj

Bauer, bona esperantista paro, kaj la edzo salutis la kunvenantaron. Mia temo de parolado ĉi-foje estis "Zamenhof kaj nuna esperanto-movado".

Vizitis s-ino Helmuth kaj mi, matene de la 16-a, la lernejon Stephen Dacatur Elementary School, kie Lisa lernas, kaj la instruistino de ŝia klaso afable permesis al mi paroli pri Japanujo kun lerta traduko de s-ino Helmuth.


Tie ĉi mi renkontis mian malnovan amikon-oomotanon, kun kiu mi pasigis unu tutan tagon. Krome, en San Diego mi povis bone ripozi kaj amuziĝi, eĉ vizitante la landliman Meksikan urbon Tijuana.

La 20-an, je 5-a ptm, mi denove troviĝis en Honolulu, Havajo, kie ĉe la flughaveno renkontis min s-ro Chambers, delegito de UEA en tiu insularo de paradizo.

Kiel Konkludo: Restas al mi multe da karmemoroj pri la nuna vizito en Kalifornio, kaj mi tutkore dankas ĉiujn geamikojn, kiuj faris sian plejebulon por agrabligi mian restadon. Mi konstatis, ke la nova tajdo leviĝas inter kelkaj agemaj esperantistoj, kiuj bone utiligante la valorajn spertojn de eminentaj pioniroj, aranĝas tamen pli efikan labormetodon; nome, enkonduko de esperanto-klaso en vesperaj lernejoj kaj elementaj lernejoj kiel oficiala afero, k.s.

Estis, tamen, bedaŭrinde por mi, ke mi havis la okazon paroli nur kun Frank Lanzonne el ĉiuj laboremaj junuloj de JEN (Junularo Esperantista de Nordameriko).

Mia vizito okazis nur du monatojn post la grava momento, kiam la reprezentantoj de la tuta esperantistaro tra la mondo prezentis la Propozon pri la Internacia Lingvo al la Unuiĝintaj Nacioj. Kvankam la evento havis lokon en la orienta parto de la vastega Usono, tiu influhava agado bone resonas en la okcidenta parto, kion atestas la fakto, ke tiuregiona konferenco de Junior Statesmen of the United States aprobis la enkondukon de esperanto en sian labormedion.



Ĉe Knolls Lernejo

Bonŝance je mia alveno en San Francisco mi ricevis freŝan informon pri la rezolucio favora al esperanto de la Socialista Partio en Japanujo, kaj mi tuj utiligis tiun novaĵon en mia parolado en diversaj lokoj.

Aparta ĝojo por mi estis, ke la filmo pri "Oomoto-Internacia Festivalo" ĝuis ĉie tre 'bonan reputacion' pro ĝia bela koloro kaj ampleksa enhavo reprezentanta la riĉan programaron de la okazintaĵo, inkluzive de Tokia U.K.

Vivohelpaj

Vortoj


Mi kompilis ilin dum la lastaj naŭ jaroj de mia vivo kaj, kio estas pli grava, praktikas ilin, tute ne rigide, kun la rezultoj, kiujn mi ĉi-sube priskribas.

Ili utilis por kanalizi la konscion al malpli memcentrita stato kaj igi ĝin pli perceptema rilate la objektivan realon. Ili almenaŭ min helpis “malglui” la menson disde tiuj statoj en kiujn ĝi ofte falas: 1) ofendsento, 2) fantazioj kaj spekulativaj pensoj ĉiuspecaj, kaj 3) surfacaj deziroj.

Ili estas aplikeblaj al psikoterapio bone disvolvante ĉiun frazon kaj adaptante ĝin al la individuaj bezonoj kaj kompreno.

Ili nepre devas esti voĉlegataj tre malrapide kaj profunde pensante pri la signifo de ĉiu vorto. Alie, ili estos, kompreneble, absolute senutilaj.

Konsiderinte tiujn bazajn faktojn, oni komencu la vivohelpajn vortojn. (Unue serena individua lokiĝo en tempo kaj spaco) Nomo de tiu kiu parolas mem (tre malrapide).



La aŭtoro (maldekstre) kaj prof. I. Lapenna, en Novjorko

Tago, monato, horo. Loko: universo, mondo, lando, urbo, adreso. Mi fortas. Mi bonfartas. Mi estas parto de ĉio.

Ĉio estas vivo kaj en miaj menso kaj penso estas senfina vivo.

Mi “estas”, forĝante la estontecon en ĉiuj ĝiaj aspektoj: korpo, penso, parolo (vera, modera, afabla, utila, paŭza), agado, deziro, sereno, tolero, humilo, gajo, amo.

Mi estas nevenkebla. Nenio povas min vundi.

Mi intencas korekte manifesti mian konon, kapablon kaj povon ĉi tie kaj nun.

Mi ne perturbos min pro la pasinteco: rememoroj, insultoj, laŭdoj; pro la estanteco: ĉiutaga vivtenlaboro, kvereloj, rutino, deziroj; pro la estonteco: espero pri persona sukceso, fantazioj, spekulativaj pensoj, kaj angoro pro timo al malsukceso, kalumnioj, senokupiĝo, milito, malsano, morto, ŝoleco.

Valoro de Urbo-ĝemeligo per Esperanto

Estas jam konate, ke la urboj Kameoka (Japanujo) kaj Knittelfeld (Aŭstrujo) per esperantistaj klopodoj por ambaŭ urboj la 12/14.4.1964 ĝemeliĝis kaj de tiam amike interrilatas. Jam trifoje Knittelfeld ĝojis pro la vizito de Kameokaanoj, kiuj ĉiuj foriris agrable emociite pro la evidenta ĝojo, kun kiu ili estis akceptitaj de la urbestro, cetera loĝantaro kaj samideanaro.

La 7-an de februaro, 1967, vizitis nin la membroj de komercdelegitaro al Eŭropo s-roj Sohei Ogo el Kameoka kaj Hiroji Ogasaka el Nagan, bedaŭrinde nur dum kvar horoj. Tamen ĉi tiu mallonga tempo sufiĉis por la interamikiĝo de la vizititoj kaj vizitintoj. Ankaŭ la ĉarma karintia-

nino f-ino Frieda Fleiss, nun interpretistino de la japana ambasado en Vieno kaj studentino en Kioto, estis agrable tuŝita de l' intima atmosfero inter la renkontintoj. La karaj gastoj de l' urbo Knittelfeld deklaris kun ŝi unuanime, nun ankaŭ lerni la lingvon de la koro, Esperanton, samtempe bedaŭrante, ke ili ĝin ankoraŭ ne posedas.

La tiel estiĝinta kaj daŭre pli intimiĝanta amikeco inter ambaŭ urboj, laŭloke tre distancaj inter si, estas konvinka pruvo pri la valoro de per-esperantista ĝemeliĝo de diversgentaj komunumoj. Ili kunpreparas la mondpacan estontecon. Tial ili fariĝu ĉiam pli oftaj.

D-ro Adolf Halbedl

Kiam oni alfrontas problemon, ĉi tiu prezentiĝas kiel ĝi estas (neniam tiom terura kiel ŝajne) kaj oni malstreĉe ĝin transiras.

Mi ne bezonas iun ; multaj bezonas min (rigardi tre proksime de mi mem). Vera forto estas scii vivi psikologie sola.

Mi estas forta : mi faros kion ajn esencan. Mi estas sana : mi faros kion ajn esencan. Mi estas juna : mi faros kion ajn esencan.

Protekti vivon (precipe homan).

Subteni ĝin en ĝia plej alta esprimo. Akcepti silente ĉion, kio okazas en la Universo kaj kio staras ekster miaj eblecoj ĝin modifi.

Pensu nur pri tio kion vi faras.

Ridetu serene.

AMU SEN KIALO.

Silentu se tio, kion vi dirus, ne estus pli valora ol la silento.

Dediĉu du minutojn por pensi pri nia persona memrespondeco por tutmonda paco kaj tuthomara feliĉo.

Ĉi Tie kaj Nun.

Esperanto-Ekspozicio

en

Bengalo

Bengala Esperanto-Instituto starigis grandan ekspozicion de esperanto en la foiro je la 6-a februaro ĝis la 8-a februaro 1967 okaze de jar-festo de Sriniketan fondita de Rabin-dranath Tagore. La ekspozicion vizitis multaj hindoj kaj inter ili kelkaj estas famaj en la tuta lando. S-ro U. N. Dhebar, iama prezidanto de la hinda nacia kongreso kaj eksĉefministro de iu hinda ŝtato, pasigis longan tempon en la ekspoziciejo. Simile sino Kamala Chattapadhaya, fama en tuta lando, montris grandan intereson kaj faris plurajn demandojn pri progreso de esperanto.

La bildo de Mahatma Gandhi en la hejmo de Romain Rolland kaj ankaŭ la bildoj de nia forpasinta ĉefministro s-ro Lalbahadur Ŝastri en Taskent kun s-ro Kosigin, la ĉefministro de Sovietunio, kreis grandan intereson.

1. Maldekstre: la bildoj de Lalbahadur Ŝastri kun s-ro Kosigin kaj s-ro Ayub Khan, la prezidanto de Pakistan; Dekstre la bildo de Mahatma Gandhi en hejmo de Romain Rolland.



Sur tablo: esperanto-literaturaĵoj.

2. La studentoj de Visvabharati-Universitato kun granda intereso studas la materialojn en la ekspozicio.

B.E.I. dankas samideanojn Petro Poliŝĉuk en Taskent kaj Paul Enz el Zürich por la bildoj.

Abani Bhushon Halder
Sekretario de B.E.I.



Bela esperanta

ekspozicio

en Nimes

Kvar aferoj, kiuj afable bonvolis kuniĝi, permesis al ni organizi esperantan manifestacion, pri kiu la regionaj gazetoj povis paroli trifoje.

Antaŭ kelkaj monatoj, ni decidis aranĝi poresperantan ekspozicion de la libroj, gazetoj, broŝuroj ktp., kiujn posedas la esperantistoj de nia urbo.

Tiam s-ro Lentaigne de Montpellier kun apogo de kelkaj grupoj kaj samideanoj estis faranta — por vojaĝonta ekspozicio — 12 skatolojn kun 90 libroj tre klare ordigitaj tiamaniere, ke ili donu klaran ideon de la verkoj, originalaj kaj tradukitaj, belliteraturaj kaj sciencaj, ktp. Tiun vojaĝontan ekspozicion Nimes ricevis la unua post Montpellier.

Post multe da prokrasto, ni tamen eksciis ke ĉ. 30 pentraĵoj kaj desegnaĵoj de japanaj geknaboj de la mezlernejo en Ajabe alvenis al la urbodomo.

Tiuj du alportaĵoj permesis aranĝi kun niaj propraj libroj gravan ekspozicion, kiu okazis la 15-an de oktobro, 1966, en la junula liceo, kaj pri kiu ni ricevis multajn gratulojn.

Tre bonŝance, la prelegantino Jana Cíková, vojaĝanta en la suda Francujo alvenis al nia urbo la tagon

mem, en kiu ni malfermis la ekspozicion. Kaj ankaŭ s-anino Joŝie Iijima, juna studentino de franca lingvo en Montpellier, konsentis veni du tagojn.

Kvankam bedaŭrinde pluvegis la tutan tagon de la 15-a de oktobro, ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis la inaŭguran kunvenon, inter kiuj troviĝis la reprezentantoj de la urbestro kaj de la akademia (departementa) inspektoro, kaj kompreneble s-ino J. Cíková kaj f-ino Joŝie Iijima, kiu lasta bonvolis surmeti sian belan kimono. Kunvenis tiuvespere ĉ. 70 por prelego de s-ino Cíková, kiu fakte estis ege interesa, kaj donis al la aŭskultantoj samtempe tre ĝustan ideon pri Praha, ankaŭ dank' al diapozitivoj, kaj tre favoran ideon pri esperanto.

Kiel vi vidas, Japanujo ĉeestis en nia manifestacio pere de la junaj geknaboj de Ajabe, kies nomoj estis skribitaj sub la propraj pentraĵoj, kaj pere de la ĉarma Joŝie Iijima, kiu tre simple, sed tre klare salutis la ĉeestantojn ĉe la prelego vespere. Dankon al la junaj Ajabeanoj, dankon al Joŝie!

Poste dum la tuta semajno, ĉ. 350 knaboj de la liceo (sed bedaŭrinde ne tre multe da eksteraj vizitantoj) vidis kaj admiris la esperantajn librojn kaj ankaŭ poŝtmarkojn, turismajn faldprospektojn, ktp. kaj tiel eksciis kio estas Esperanto.

Dank' al tio du kursetoj probable funkciis ekde novembro por dek ses kuraĝuloj, kiuj ne timas aldoni iom da laboro al la jam pezaj studoj de franca liceano. Ĉu ili persistos?

Raportas: *s-ino Renée Volpelière*

Pere de Esperanto tra Francio

Ĉiam mi sopiris viziti la tiel nomatan “dolĉan Francion”, kaj tio efektiviĝis ĉi-oktobre je invito de Tuluza Esperanto-Asocio, kiu invitis min por tutmonata prelegvojaĝo tra Francio, kie mi en 16 diversaj urboj, en Muret, Toulouse, Castres, Perpignan, Narbonne, Beziers, Montpellier, Nîmes, Marseille, Avignon, Aix en-Provence, Hyeres, Nice, Tours, Angers, Le Mans, prelegis en Esperanto por ne-esperantista publiko kun helpo de eminentaj tradukistoj, kio per neentruda maniero demonstris kapablecon de la LI kaj kapablis konvinki la publikon tiagrade, ke tuj post la prelegoj ekzemple en Toulouse kaj Castres la publiko aĉetadis la lernolibrojn pri Esperanto aŭ la broŝurojn pri Esperanto-movado.

La afero estis bonege aranĝita; pro la anticipa propagando en ĉiuj urboj sur videblaj lokoj estis pendigitaj grandformaj afi-

ŝoj kun mia portreto kaj kun logaj titoloj pri ORA PRAHA CENTTURA, ĈEĤOSLOVAKA VESPERO kun ĈEĤA MUZIKO. Mi ne scias, kiu logis la publikon pli multe, ĉu la temo pri Ĉeĥoslovakio aŭ pri Praha, aŭ la eksterkutima cirkonstanco, ke la prelego okazas en Esperanto kun samtempa traduko, ĉar okazis, ke la ejoj en ĉiuj urboj estis plenplenaĵoj kaj ĝenerale vizitis la prelegojn 100, 150-250 personoj.

Mi ne nur spertis grandan interesiĝon de la publiko pri mia lando, pri ĝia ĉefurbo, sed mi estis ankaŭ gastigita en francaj familioj, kiuj montris al mi senescepte tipe francan gastamecon, mi ligis novajn amikecristojn, kiuj post mia hejmenreveno daŭras. Ili fariĝis poreternaj.

En Perpignan okazis vespero kun programo de Gajaj Trubadoroj, kiuj komence, meze kaj fine kantis kaj ludis por mi. Mi ne



Inaŭguro de Esperanto-Ekspozicio en Nîmes, Francujo

forgesos la momenton, kiam la ĉefa kantisto kantis por mi “La Bukedo de Parizo”, la bukendon ankaŭ vere al mi transdonis kaj laŭ loka kutimo ĉirkaŭbrake kisis miajn ambaŭ vangojn dum okazis brua aplaŭdo de la publiko. Preskaŭ en ĉiuj urboj venis unuope ĉeĥdevenaj civitanoj, kiuj jam de longe vivas en Francio, tamen kiuj ne forgesis sian patrujon kaj lingvon, kaj kiuj sentis egan feliĉon povante paroli ĉeĥlingve kun sia samlandanino. Kortuŝe estis por mi aŭdi de iu patrino en Toulouse, ke ŝi tiom ŝatas Praha-n, ke sian filon, kvankam naskitan en Francio, ŝi edukas, krom en la franca, ankaŭ en la ĉeĥa lingvo. Mi ne povas forgesi la momentojn, kiam alpaŝis min la homoj, kaj tute simple diris al mi: Sinjorino, nur egan komplimenton mi volis esprimi al vi por la brila prelego. Dankon! Kelke da vortoj kaj kiom ili varmigis min, kiu estis tiom malproksime de mia hejmo, inter fremdaj homoj, sed tiumomente — mi sentis min en hejma medio.

La franca gazetaro dediĉis multege da atento al mia prelego, publikigante longajn kaj tre flatajn artikolojn kelkfoje samtempe en du, tri diversaj gazetoj, kun la fotografaĵoj pri la vespero. La Radio en Toulouse, Perpignan kaj Angers petis de mi la intervjuon.

En Narbonne mi ekinteresis la publikon per la mencio, ke Praga Katedralo de S-ta Vito estis konstruita laŭ la planoj de tiu en Narbonne, precipe ĝia unua parto el la 14a jarcento. En Bezier tio estis la antikva ponto el la 14a jarcento, kiu havas saman sorton kun la Karolo-ponto en Praha. En Montpellier ekestis post la prelego longdaŭra debato kaj diskuto pri diversajoj, la publiko daŭrigis siajn demandojn pri Ĉeĥoslovakio kaj Praha, tiel ke la aranĝintoj devis interrompi la vesperon pro tro malfrua horo. En Marseille la antaŭe preparita ejo fariĝis tro malgranda por la publiko, en la lasta momento estis necese ŝanĝi ĝin je prelegejo pli granda kaj konvena. En Angers la aranĝ-

intoj enkonduke al mia prelego projekciis mallongan informan filmon pri Ĉeĥoslovakio, kio agrable kompletigis mian propran prelegon kaj la sekvan tagon aperis en la gazeto fotografaĵo, kiu montris la prezidanton de loka Turisma Agentejo, kiel li akceptas min kaj kelkajn esperantistojn en sia oficejo ĉe gastige preparita tablo kun frandaĵoj kaj vino.

En Tours pro malfruiĝo de mia vagonaro neniu atendis min en la stacidomo, mi sentis min perdita por kelkaj momentoj, sed kiam mi enpaŝis en la informojn turisman, mi estis tuj savita pro cirkonstancoj por mi tre favoraj. Unu el la deĵorantinoj tuj ekkonis min laŭ la fotografaĵo sur la afiŝo, sekve de tio ŝi tuj telefonis al la adreso, kiun mi indikis kaj per taksio ŝi veturigis min al koncerna loko.

Sed tre interesajn rememorojn mi havas pri la urbo Montpellier, kie mi renkontiĝis kun sinjorino Verne, kiun mi ekkonis jam en Praha kiam mi gvidis la italan grupon da esperantistoj, kaj en ŝia loĝejo mi renkontiĝis kun juna japanino. Dum agrabla babilado ĉe la tagmanĝotablo mi eksciis, ke ŝi studas francan lingvon en Montpellier. La juna japanino sekvis min ankoraŭ en la urbon Nimes, kie ni kune inaŭguris la Esperanto-ekspozicion por la publiko dum ĉeesto de elstaraj personoj de la urbo, inkluzive la urbestron Bondurand, ni do estis komune fotografitaj por gazeto, ŝi en sia japana blanka kimono. Vespere en la ekspoziciejo okazis mia prelego kaj la japanino estis prezentita kaj petita pri kelkaj vortoj. Mia prelego havis do eksterkutiman enkondukon. Ankaŭ en Nimes aperis longa kaj tre favora artikolo pri ni du kaj la ekspozicio.

En Aix-en-Provence mi renkontiĝis kun japano sinjoro Ŝosaku Isobe el Nagoja, Japanujo, kiu hazarde loĝis en la sama vilao de sinjoro Jullien kaj tie ni kune vespermanĝis. La dommastrino povis proponi al nia amiko la japanajn manĝobastonetojn,

kiujn li tre bonvenigis. La sinjorino diris, ke ŝi ricevis ilin de sia edzo, kiu partoprenis la Kongreson en Tokio. Ni ĉiuj tre rapide interkonatiĝis kaj la sekvan tagon antaŭtagmeze ni kune vizitis lokan lernejon kaj antaŭ la lernantoj ni manifestis la vere internacian interkompreniĝon. La infanoj tre entuziasmiĝis vidante japanon, lian fotilon kaj la demandoj jen pluvadis el iliaj buŝoj. Ni estis tre kontentaj pro nia komuna vizito ĉe la lernantoj, ĉar ankaŭ tio estis bonega propagando por Esperanto. Restos fotografiaĵoj pri tiu ĉi ĉef-franc-japana renkontiĝo, sed ankoraŭfoje mi renkontis sinjoron Isobe! Okazis en Angers. Meze de mia prelego mi konstatis, ke li dum sia vojaĝo tra Francio haltis ankaŭ en Angers kaj leginte la afiŝon li vizitis mian prelegon. Li ankaŭ estis invitita paroli al la publiko kaj mi tre ĝojis, ke la vesperoj estis riĉigitaj ĉiam per eksterlandaj partoprenantoj, kiuj havas okazon montri al la publiko la utilizeblecon de la lingvo Internacia. Mia granda ĝojo estis vidi, ke post la prelego juna knabo tuj alpaŝis la prelegetablon kaj

petis aĉeti la lernolibron. Kun la japano ni lastan fojon manpremis kaj promesis resti en skriba kontakto de tempo al tempo.

En Aix-en-Provence tagmezan bankedon partoprenis unu samideano el Maroko, edziĝinta en Francio, finnlandanino, du belgoj vivantaj 15 jarojn en Aix kaj mi, ĉefino kun la francoj. La eksterlandanoj post la tagmanĝo donace ricevis po unu botelo da provenca vino rememore.

Mia prelegvojaĝo finiĝis, sed mi sentas min fine tiom riĉa je la impresoj pri beleglando, kiun mi povis viziti, ke mi nepre devas tiumaniere esprimi senmezuran dankemon al la aranĝintoj de la tuta entrepreno, kiu alportis grandajn sukcesojn por la vigligo de la Esperanto-movado en Francio. Mi tre ĝojas pro la utile farita kaj plenumita tasko por nia komuna celo kaj dankas por la afableco de ĉiuj, al kiuj mi ŝuldas la memoron de miaj ĉarmaj momentoj kaj tagoj en Francio.

Post mia lasta artikolo en antaŭa numero NUR ESPERANTON mi denove povis uzi Esperanton en la praktiko.

Forumo de niaj legantoj

Bienno, 30 — 1 — 1967

★ *Estimataj s-roj!*

Ĉar pro privataj personaj aferoj mi forrestis dum ĉirkaŭ 7 monatoj el mia hejmo, nur nun mi trovis la senditajn n-rojn de Oomoto kaj tie legis la serion da artikoloj pri Malto plume de s-ro Carmel Mallia el Vittoriosa.

Mi, kiel Komunista Revoluciulo, kiel

Sennaciulo (sed mi absolute abomenas la malrevolucion socialdemokratitan politikon de l' S.A.T. = estraro) kaj kiel membro de la Kolektivo nomata "Itala Proletaro", kiun tiranas Wall Street kaj la papo, nepre sentas la devon atentigi vin pri konsiderindaj malpravaĵoj entenitaj en la ĉi menciitaj artikoloj. Estas klarvideble ke ĉi artikoloj estas senhonte kaj senpudore favoraj al la Angla imperiismo!

La historio de Malto plektiĝas dum la fluo de la jarcentoj kun tiu de la Itala nacio. Kiel vole-nevole devis rekonigi ankaŭ s-ro Mallia, Malto estis ligita dum ne malpli ol la bagatela periodo de duona jarmilo kun Sicilio (atentu ke Italio unuiĝis nur antaŭ 1 jarcento). Kiam li devis menci la nomon de l' ĉefaj urboj li tion

povis nur uzante la italegajn nomojn : Vittorio, Citta Vecchia, La Valletta. Li ne povis ne mencii ke ĝis antaŭ 30 jaroj la altrange uzita lingvo estis la itala (ankaŭ ĉi punkte li strebas por “porti akvon al la muelejo” de l’ Brita imperiismo atentigante ke la popolamaso ĝin malbone komprenis, sed tio estas fenomeno komuna en multaj subevoluintaj regionoj en Italio, des pli estis tiel jardekojn antaŭe).

En la Malliaaj artikoloj estas svarmo da punktoj, kie elmergiĝas asertoj de lakeismo kaj de sinteno de botolekanto de l’ Brita imperiismo ! Mi nur povas abunde citi : parolante pri Napoleono li nur atentigas ke la generalo rabis la insulon pri orajoj (ĉu ne ĉiutage la Brita imperiismo kaj internacia grandkapitalo rabas la Malтан proletaron pri la fruktoj de sia laboro ? Kial li ne tion denuncas ?), sed li domaĝas eĉ l’ vorton pri la grandaj sociaj transformoj kiujn portis Napoleono. Li tre laŭdis la neklaskonscian parton de la popolo kiu, katenita ankoraŭ per la pensmaniero de feŭdismo, faris tumultojn kontraŭfrancajn (kaj kiel nun la nacio sur la plejfronto de l’ batalo por la homa progreso kaj Revolucio estas la Ruĝa Ĉinio tiam ĝi estis la Jakobena Francio) okaze de la vendado de l’ ekleziaj propretoj kaj bienoj kie la stultuloj ekspluatite laboris por riĉigi la grasajn pastrojn ! Li prezentas la famekonatan “Borbonan” reĝon de Napolo kaj lian indan kolegon Nelson, kun la manoj makulitaj per la sango de la de li murde pendigitaj patriotoj de la Partenopea (Napola) Jakobena Respubliko de 1799 kiel ĉampionojn de l’ Libereco !

Kiam oni alvenas al la funebra jaro 1814, turpa jaro dum kiu la Eŭropa nobelaro kaj gereĝaro diboĉe balis piedpreme super la dronintaj esperoj pri Iluminisma Revolucio Respublika de l’ popoloj eŭropaj, kion li (s-ro Mallia) diras ? Ĉu li havas kondamnajn vortojn por tiu turpa kunvenintaro da feŭdaj tiranoj mezepokaj (inter

kiuj inde elstaris la fifama s-ro Metternik sentencanta : “Italio estas nur geografia esprimo” kaj ĝiaj diversaj regionoj asignitu al siaj princoj aŭ dukoj aŭ aliaj ĉi specaj friponoj kun la papo ĉekape) inter kies viktimoj ennombrigas la Malta brava popolo tutegale kiel la aliaj popoloj ? Ne !

S-ro Mallia nur zorgas mencii la memor-surskribon je kiu la Britaj reĝoj (kaj grandkapitalo) transformis Malton (same kiel Gibraltaro kaj Cipro, kiun nun dominas, mastroŝanĝe, U.N.O.) en gardostarejon meze de la Mediteraneo ! Kia “Voĉo de Eŭropo” ! ? Voĉo de Eŭropo estas tiu de ĝiaj popoloj kaj laborista klaso ! kaj ne tiu de la feŭdmastroj kaj papo kaj S. Alianco !!

Antaŭ ol fini, mi bone atentigu, ke mi per tiu mia letero ne volas aserti ke l’ aktuala burĝa rezistaro de Italio okupaci Malton ! (ankaŭ se tio estus ĉiam preferinda ol la Brita okupacio, kiu laŭ s-ro Mallia ja ne plu ekzistus ĉar, laŭ li, kaj laŭ Wall Street, ja Malto estus egalulo en la grandfamilio Commonwealth). Sed mi volas aserti la “pravajon” (“pravaĵo” por ni ! Proleta klaso ! — ja ne “pravaĵo” por la kapitalistoj — kaj ĉar la proletaro estas ĉe la plejfronto de l’ homaremancipa batalo ĝi do estas “universala” pravaĵo !!) de ĉiam ĝisfunde kontraŭi al porimperiistaj artikoloj. Mi nur tutdeziras ke la Estontaj Soveta Itala Respubliko ŝultr-ĉe-ŝultre kun la Soveta Malta Respubliko plej multe kontribuu al la konstruo de la Nova Mondo Morgaŭ ! de Komunismo !!

P.S. : ĉar s-ro Mallia havas tiom lertan plumon por pledi insul-sendependecojn, partikularecojn kaj aŭtonomiigojn, kial li ne verkas samspecan artikolon por pledi la sendependecon de Tajvano kontraŭ la Ruĝa Ĉinio kaj la Tajvanan sendependecon en la sino de la granda komunumo de S.E.A.T.O. aŭ de la tiel dirita “libera mondo” ! ? !

kun Revoluciaj Esperantaj salutoj
via : Delgado-Granados

Filoj de Dio, Adorantoj de Dio

Fotita kaj verkita de Hideo Haga, membro de Japana Asocio de Fotistoj. 300 fotogravuraĵoj, kiuj prezentas diversajn aspektojn de la Oomoto-Organizo kaj-Movado, kun klarigaj tekstoj japana kaj esperanta. Esperantigo de T. Nakamura. 290 paĝoj (18×26cm). Prezo : 5 usonaj dolaroj plus 10% por sendkostoj.

Kvinteto

Broŝura eldono, represita el la "Filoj de Dio, Adorantoj de Dio". Facilaj vortoj — religiaj eseoj kaj notoj — poemoj, porinfanaj rakontoj kaj drametoj, el la plumo de la kvin gegvidantoj de la Oomoto-movado. 64 paĝoj (21×14.5cm). Prezo : 0.50 usona dolaro.

Enciklopedieto Japana

Verkita de T. Nakamura, redaktoro de Oomoto. 400 kapvortoj inkluzive de 150 botanikaj kaj zoologiaj terminoj — glositaj kun 80 fotobildoj. 220 paĝoj (22×15.5cm). Prezo : 5 us. dol. plus 10% por sendkostoj.

Okakura-Kakuzo : La Libro de Teo

Esperantigita de T. Nakamura el la anglalingva originalo. Interesaj diskursoj pri orientaj filozofioj kaj idealoj, kun "Teo" kiel la ĉeftemo. Klasika sed ĉiam-aktuala kontribuo por la interkompreniĝo de la Okcidento kaj la Oriento. 144 paĝoj (18.2×12.8cm). Prezo : 2.50 us. dol.

Utafesta Poemaro

Ĉi tiu poezia libro eldoniĝis, je la 1-a datreveno de l' Oomoto-Internacia Festivalo, kun 29 poemoj elektitaj el ĉiuj kontribuaĵoj de la Utafesto. La libro konsistas el du partoj : Parto I entenas la poemojn premiitajn, kaj elektitajn por "Laŭdo", kun la portretoj de la laŭreatoj, kaj Parto II entenas 15 poemojn, poste elektitajn por pliriĉigi la enhavon de ĉi tiu memorlibro. — Oomoto 105 p. 2 dol.

Mendu ĉe : **Oomoto**

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo